



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 211

Novembro 2003

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



EL LA ESTONTECO: LETERO POR FRIDIGI LA SPINON

*„La Hotelo”, Old Sambro Road
Halifakso, Atlantiko
Distrikto de Nov-Anglio
Usono.
ĉimanĉon, la 22an de novembro, 2054*

*Axius Furtwangler
74 Lexden Vojo
Kolĉestero, Graflando Essex
Britiĵo*

Mia kara nevo,

mi pardonpetas, ke mi ekde kelkaj jaroj ne skribis al vi. Estas malfacile al mi, elspezi kvaronon de la monata salajro por la afranko kaj cenzuro. Ankaŭ sufiĉe da forto kutime mankis al mi eĉ pripensi pri korespondado post tuta semajno da laboro. Pri tiu mi ĝojas povi raportiti al vi, ke antaŭ tri monatoj oni malpliigis la sabatajn horojn de laboro ĝis dek, kaj tiu estas mirinda helpo; plusa tempo en sabato por iom dormi kaj ripozi multe riĉigas por ni la ĉimanĉon - benita tuttago de nelaboro.

Halifakso kreskas, iom post iom. Estas nun pli ol dek mil homoj en la halifaksa regiono, sed malmultaj loĝas en la malnova kvartalo ĉe la duoninsulo. Tie, krom la kaptita pluvakvo, ne estas akvo por trinki, kaj oni jam de longe forbruligis la arbojn.

Restas nur la ligno el la malnovaj domoj por hejtado. Ĉe ni, en la periferio, brulligno sufiĉe haveblas, kvankam ĉiujare ni devas vojaĝi iom pli longan distancon por trovi arbojn. Ĉi tie ni havas ankaŭ fojnon por la ĉevaloj kaj grandan ĝardenon plenplenan de legomoj. Estas granda beno, ke la granda venenado ne tuŝis Lagon Long, kaj ni havas sufiĉe da akvo almenaŭ mezkvalita. Feliĉe, cervoj kaj histrikoj abundas, do mi ne anticipas ripetadon de la Malsato de '45.

Kvalito de la vivo ĉi tie iom post iom pliboniĝas. Mi nun havas propran ĉambron en nia granda restaŭrita domo. Pli ol duono de la konstruaĵo okupas nia Ĉefo kaj lia familio, sed tiu inkludas liajn tri kreskiĝintajn filojn kaj iliajn familiojn. Estas kvin aliaj familioj kaj dek senfamiliaj individuoj en nia domo, 51 homoj entute, kaj ni kune estas oficiala laborunuo. Iam ni pensas, ke ni estas kvazaŭ pioniroj, kiuj devas ĉiam adaptiĝi kaj elpensi novajn metodojn por transvivi. Ŝajne la Urbestro estas kontenta pri nia Ĉefo kaj la laboro de nia grupo, kaj li ne multe ĝenas nin. Mi vidis eĉ ne unu soldaton en multaj monatoj - fakte jam pasis pli ol tri jaroj ekde kiam laste la soldatoj mortpafis homon ĉi tie pro laborevito.

Eble dufoje en monato mi devas aliĝi al skipo por enterigi la kadavrojn (nun plejparte nur arojn da ostoj). La venenado de la ĥalifaksa akvolagoj estas eĉ pli efika mortigilo ol la Dua Pesto. Tiuj skipdevoj donas al mi okazon paroli al homoj el alia urbo-partoj. Mi ankaŭ laboras jen kaj jen en skipoj por ripari la vojon. Krom tio, mi laboras precipe en la komuna ĝardeno kaj ĥakas kaj amasigas la brullignon. Inter aliaj pluj taskoj mi ankaŭ helpas prizorgi la ĉevalojn; ili sufiĉe ofte malsanas, ĉar plejparte ili estas posteuloj de rajdĉevaloj. Nur pro interbredado generacion post generacio kun laborĉevaloj de la Valo ili komencas fariĝi vere taŭgaj por peza laboro. Jen la nuna „profesia laboro” de homo, kiu doktoriĝis pri matematiko; oni devas adaptiĝi. Universitatoj estas luksoj el la pasintaĵo.

Plejparte, niaj laboristoj faligas la arbojn per mansegiloj, kelkaj preskaŭ eluzitaj post jardekoj, kelkaj manfaritaj el trovitaj metalpecoj. En nia grupo estas unu ĉensegilo; Rikardo, tre lerta filo de nia Ĉefo, modifis la motoron por utiligi alkoholon. Ni havas grandan cisternon en kiu ni fermentigas (inter aliaj aferoj) maizon. La aparato por distili estas sufiĉe simpla. Tamen mi tre malŝatas la taskon poste purigi la cisternon pro la aĉa fiodoro.

Estas iom ironie, ĉu ne, ke Usono liberigis nin pro disputo pri nafto, tamen ni ne havas benzinon. Laŭ la Monata Informilo, benzino estas ankoraŭ havebla en okcidenta Usono, aparte en la Nordokcidenta Distrikto. (Eble vi ne memoras, sed tiu regiono estis iam Montano, Alberto, Yukono, Saskatĉuano kaj la Dakotoj.)

Vi skribis, ke en Kolĉestero estas ruinoj de romia muro ĉirkaŭ la urbo (kaj ankaŭ ruinoj de normanda kastelo). Laŭ mia memoro de la historio, Britio estis unu el la unuaj lokoj, de kie la romianoj fortiris, kiam la imperio komencis kontraŭi. Ĉu vi ofte renkontas aliajn ekzilitojn en Britio? Kiel ili reagis al la fakto, ke pro la vojaĝĉesado, ili neniam povos reveni al la amerikaj kontinentoj? Mi bone memoras la epokon antaŭ la fermo de la ĉieloj, kiam mi preskaŭ ĉiusomere vojaĝis al Britio aŭ Eŭropo. Eĉ post la bombodetruo de la flughavenoj en Novjorko kaj Tokio, mi kaj kelkaj aliaj kuraĝuloj daŭris aviadi. Sed post la hororo de la Nigra Merkredo ĉio ĉesis. Imagu: sep aviadiloj - preskaŭ tri mil pasaĝeroj - malaperis en nur unu tago. Mi kredas ke nia registaro faris ĝustan decidon pri la malpermeso de civitana aviado.

Mi bone memoras, kiam mi estis junulo, antaŭ ol vi naskiĝis, ke la Prezidento anoncis krucmiliton kontraŭ teroristoj. Estis tuj post la ekŝoka 11-a de septembro - mi forgesas la precizan jaron. Mal-feliĉe, la islamanoj pastroj bone komprenis, kio estas krucmilito - estas kiam la kristanoj venas por detruigi urbojn kaj amase murdi civitanojn - eble ankaŭ soldatojn, sed ili precipe pensas pri virinoj kaj infanoj. Tiam estis la vera komenco de la Fantoma Milito. Kurioze, ĉu ne, ke Buŝ La Pli Juna, kiu tiom fervoris kontraŭ terorismo, neniam eĉ pripensis la ŝlosilan demandon: „Kial ili tiom multe malamas nin?”

Komence estis nur la problemo de la senfina milito en Irako kaj kelkaj teroristoj, sed poste ĉelo sekvis ĉelon kaj jihadantoj ekaperis en pli ol 90 landoj. Tiuepoke ni supozis ke nur islamanoj sufiĉe malamis nin por aliĝi al la gerilanoj - sed baldaŭ evidentiĝis ke preskaŭ ĉiu lando en la iama evoluinta mondo donis almenaŭ kelkajn fantombatalantojn. Por paroli juste, eble nur eta ondo de unu procento de la mondo militas kontraŭ ni, sed eta ondo de kvin miliardo ja estas impona kaj timiga nombro, ĉu ne?

Fakte, mi memoras la formalan publikigon de la doktrino de bin Laden - estis eble nur ses aŭ sep jaroj post la komenco de la dua Iraka milito. Osama mem anoncis per vidaŭdbendo - kaj pro la ekmalvarmo kiun mi sentis en mia spino, mi ankoraŭ povas memori preskaŭ ĉiun vorton - „La nekredantoj deziras batali per siaspeca milito, sed ne venkos per nia speca: el la ombroj, kaŝ-fantome, silente, martire, persiste kaj, se necese, eterne”.

Pardonu la mensovagadon de maljuna homo, sed mi havas memorojn, kaj ili ofte traktas aferojn kiuj troviĝas nek en la gazetoj nek en historilibroj. Mi ne povas forviŝi memoron de miaj sentoj kiam mi vidis per la televido, en la plej frua etapo de la dua Iraka milito, la kadavrojn de la civitanoj en Bagdado, aparte de la infanoj, kaj de tiu etulo sen brakoj pro la bomboeksplozo. Ĉu vi scias, ke via patro havis veran talenton por morda ironio? Kvankam li honore servis en la armeo en kaj la Palestina kaj la Siria kampanjoj, li jam delonge konvinkigis, ke la milito estas afero de la diablo. Imponis min lia amara diraĵo: „Kiom da infanoj iliaj ni devas mortigi, por ke la Islamanoj amu nin?” Via patro estis bona homo - estas tragedio ke li pereis en la Irana katastrofo.

Tamen, ni transvivas. Mi devas fini mian leteron kaj rapidi, por ke ĝi atingu la registaran radiosendostacion en Bostono. Mi esperas, ke mia letero trovos la cenzuriston en bona humoro. La poŝta velŝipo foriros de Haveno Ŝag je mardo. Mi penas trovi iun, kiu marŝos en tiu direkto.

Skribu al mi pli pri via vivo en Anglijo. Mi scias, ke ankaŭ ĉe vi estis multe da morto kaj detruo. Mi aŭdis, ke homoj el Britio jen kaj jen vizitas Eŭropon, malgraŭ la perdo de la submarkola tunelo. Ĉu vi iam tion faris? Ĉu multe restas el la malnova Francio? Nia unusola gazeto ne donas al ni multe da informo pri la vivo en aliaj landoj.

Elkore salutas vin via maljuna Onklo

Redfield

— Verkis Steĉjo